FERVOJA ESPERANTISTO

Informilo de Germana Esperanta Fervojista Asocio

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bahn-Sozialwerk

Fondita 1952 Numero 1 Januaro / Marto 1996



Unu el la ekskursceloj
la romanikstila baziliko St. Cyriakus en Gernrode
fondita en la jaro 959 kaj komplete konservita

Ni renkontiĝos en Alexisbad por la jubilea 40a jarkunveno

Ĉu eta festo? Certe! Kiam ni en 1957 la unuan fojon improvizis GEFA-jarkunvenon en Fulda, ni ne sciis, ĉu kaj ke ni kapablos jaron post jaro aranĝi tian kunvenon. Sed laŭ tiama situacio neniel ajn estis antaŭvideble, ke ĝuste la jubilean 40an jarkunvenon ni povos festi en regiono, kiu tiam kaj ĝis 1989 ne estis alirebla por tiaj aranĝoj. Ĉar Alexisbad (Aleksisbad) situas en teritorio de iama DDR en la nordorienta Harz-montaro.

Tial komence de tiuj linioj mi aparte dankas al nia koncerna distriktkomisiitino Thea Mohr kaj al ŝia edzo Wolfgang, kiuj spontanee invitis tiun kunvenon. Kaj same la danko iras al la BSW-distriktestraro Halle, kiu de komenco subtenis nian intencon kaj helpis laŭ siaj eblecoj.

La kunvenejo "Hotel Harzquell" (Harcfonto) certe kontentigos ĉiujn partoprenantojn. Estas interese, ke tiu hotelo ĝis la germana reunuiĝo ekskluzive servis por loĝigi privilegiitajn personojn kaj sekve respektive lukse estis konstruita. Kiam poste forfalis ĉiuj subvencioj, la hotela personaro decidis konservi "sian" hotelon propraforte. Ili komune kolektis la necesan kapitalon kaj savis la belan konstruaĵon.

Alexisbad situas en la valo de Selke, laŭ kiu rivero havas sian nomon la ĉarma etŝpura fervoja linio "Selketalbahn". Per ĝi oni atingas Alexisbad ekde stacio Gernrode. En la venonta numero ni publikigos horaron kaj rakontos pri tiu fervojo, sur kiu ankoraŭ trafikas laŭplanaj vaportrakciataj trajnoj.

La programo de la jarkunveno kiel kutime estos varia kaj alloga. Ni klopodos, ke ĝi havos iom festan karakteron kaj donos impreson pri tiu regiono, kiu estas unu el la historie plej eventoriĉaj partoj de Germanio. Pro tio ni konatigos niajn gastojn kun du precipe gravaj lokoj, nome Gernrode kaj Quedlinburg (Kvedlinburg). En Gernrode ni vizitos la plej malnovan bazilikon de Nordgermanio, fonditan 959 de grafo Gero kiel monaĥinejo. Ĝi estis konstruita en pure romanika stilo kaj tiel plene estas konservita (vidu titolbildon). La eksteraj muroj ne enhavas morteron. Interne troviĝas la imitaĵo de la laŭdire Sankta Tombo de Kristo en Jeruzalem.

Quedlinburg estas iama regejo de germanaj reĝoj, fondita 919 de Heinrich Ia. En la 15a jc. estis Hansa-urbo. Antaŭ la urbdomo (1615) figuro de Roland (1427), simbolo por urbaj rajtoj. Pli ol 300 trabfakaj domoj. Sur la kastelmonto dum jarcentoj troviĝis regna monaĥinejo por nobelulinoj, kies abatino dum jarcentoj regis super la tuta regiono. En la apuda romanikstila preĝejo St. Servatii (1129) estas la tombo de Heinrich Ia kaj lia edzino Mathilde. Krome en la programo estas vizito de najbara al Alexisbad tipa montara urbeto Harzgerode, atingebla eĉ per la etŝpura fervojo. Kompreneble ni enplanas, prezenti ankaŭ iom de la harca folkloro kaj muziko.

En la faka parto de la jarkunveno kiel kutime okazos kunvenoj de la estraro kaj de la GEFA-funkciuloj.

Entute la jarkunveno estos tre vizitinda. Venu multnombre kaj kunvenigu multajn interesitojn. Ankaŭ niajn eksterlandajn amikojn ni kore invitas al tiu bela montaro. Aliĝiloj ankoraŭ haveblas ĉe la distriktaj komisiitoj kaj ĉe sekretario Hans-Jürgen Riehn, Karlsbader Str. 89, DE-08355 Rittersgrün.

Giessner, prezidanto

DISTRIKTO HANNOVER - ŜANĜO DE LA KOMISIITOJ



34 jarojn Werner Heimlich fosis sian sulkon kiel komisiito en la BSW-distrikto Hannover. En 1962 li transprenis tiun oficon kun elano kaj fidinde gvidis ĝin ĝis nun, kvankam en la lastaj jaroj lia sanstato ne faciligis tiun taskon. Male, li eĉ aldone transprenis la dissendadon de "Fervoja Esperantisto" (antaŭe Bulteno) kaj de "Internacia Fervojisto". Dum tiuj pli ol tri jardekoj en la distrikto Hannover okazis tri jarkunvenoj, nome 1966 en Uelzen, 1978 en Bremen kaj 1989 en Verden. Por ĉiuj, kiuj partoprenis ilin, tiuj kunvenoj atestis la organizkapablon de Werner Heimlich kaj restas belaj memoraĵoj.

Kompreneble li partoprenis en multaj IFEF-kongresoj kaj en ĉiuj jarkunvenoj, en ties kunsidoj same kiel en la ĉiujaraj printempaj kunsidoj, kvankam la ofte longaj vojaĝoj ĝenis lin, kiu ja grave estas malhelpata en sia movebleco.

GEFA ŝuldas al Werner Heimlich multe da danko por tiu longega kunlaborado. Li estis modelo por fidindeco, kaj certe multaj el liaj amikoj bedaŭras, ke li ne plu polas kunagi. Tio tamen ne malebligos, ke li kune kun sia estimata edzino Hanna kiel sentaskulo partoprenos ankaŭ estontece en la rondo de siaj malnovaj amikoj. Kiel prezidanto de GEFA mi alkroĉas mian personan dankon por ĉio, kion Werner per sia helpemo faris dum 34 jaroj. Kaj mi inkludas en tiun dankon Hanna, sen kies helpo kaj komprenemo tia daŭra kunlaborado ne estus estinta ebla. Ni deziras al nia sepdekjarulo kaj ŝi ankoraŭ multajn jarojn komunajn en kontentiga sanstato.

La funkcion de komisiito en distrikto Hannover transprenis ekde 1.1.1996 Karl-Heinz Marzahn, Bremen. Ni tre dankas al li por lia preteco. Ni deziras al li, ke li sentos sin agrabla en la rondo de la funkciuloj kaj havos ĝojon kaj bonajn rezultojn en sia nova tasko.

Giessner, prezidanto

PRINTEMPA KUNVENO

La ĉi-jara printempa kunveno okazos en Fulda sabaton la 23an de marto denove en la stacia restoracio. Ĝi havas novan estron kaj estos malfermita ankaŭ sabate, Sekve ankaŭ la manĝado estos tie.

Daŭro de 11.00 horo ĝis ĉ. 16.00 horo. Invitilo kaj tagordo venos aparte.

William Auld

unu el la plej gravaj kaj spertaj esperantistoj, aŭtoro kaj poeto el Skotlando, eldiris siajn pensojn pri sia sintenado rilate al la lingvo Esperanto. El tiuj vortoj ĉiu el ni povas ĉerpi proprajn fortojn kaj internan helpon por si mem. Tial ni ekstrakte citas el la vortoj de Auld:

Elstara motivo de mia sintenado estas lojaleco al tiu mirinda homo, d-ro Zamenhof. El ĉiuj proponintoj de projektoj de internacia lingvo li estis la sola, kiu traktis la problemon serioze kaj praktike. Kompare kun li, ĉiuj aliaj estis kaj estas diletantoj, hobiistoj, teoriemuloj, laŭ kiuj la mondo bezonas nur lingvon "helpan", uzotan nur piĝine en okazoj, kiam nenio alia efikas. Ne venas al ili en la kapon, ke lingvo, por esti lingvo, bezonas antaŭ ĉio homojn, kiuj ne nur parolas ĝin, sed ankaŭ pensas, sentas, spertas kaj amas per ĝi.

Jam de la komenco Zamenhof konstatis kaj sentis en koro kaj cerbo, ke la sennombraj lingvoj en la mondo ne nur disigas, sed ofte ankaŭ malamikigas la homojn. Kaj li celis krei lingvon realan, kapablan esprimi, eĉ emocie, ĉion, kion esprimas la aliaj lingvoj. Al tiu celo li dediĉis sian vivon, eĉ je kosto de sia materiala bonstato.

Ne estis eble al mi dum mia vivo perfidi tiun mirindan homon, kies klarvido, obstino, celtrafo kaj esenca homeco, kaj la modesto, kiu animis ilin, estas tiom profunde admirindaj. Al tiu homo kaj al Esperanto mi neniam povus turni la dorson.

Ligas min al Esperanto ankaŭ la fakto, ke la esperantistoj estas pravaj. Tio, kion ni pretendas rilate nian lingvon, estas vera, konstatebla kaj pruvebla. Kaj tial senĉese min obstinigas homoj, kiuj diras malveraĵojn pri Esperanto, ekzemple t.n. sciencistoj, kiuj verdiktas surbaze de antaŭjuĝoj kaj senbazaj supozoj. Aŭ politikistoj, kiuj regas nin kaj la mondon, ne povante paroli rekte unu al alia.

Trie ligas min al Esperanto ties granda esprimivo, kiu ankoraŭ ne estas plene malkovrita. Esperanto memorigas min pri la angla lingvo en la 16a kaj 17a jarcentoj, kiam ĝi estis elasta, kolorplena kaj vigla. La angla estas mia denaska lingvo, kaj mi amas ĝin. Ĝuste tial mi konstatas kun fortega tristo ĝian nunan dekadencon. Sed des pli valoras al mi la elasto, kolorpleno kaj viglo de Esperanto, ties precizeco kaj subtilo, neimageblaj por tiuj, kiuj ne spertis ilin. Al tio mi neniam volus turni la dorson.

Laste mi menciu la amikecon. Dum mia vivo mi akiris multoble pli da veraj amikoj ol mi akiris per mia lingvo denaska. En dekoj da landoj tra la mondo loĝas individuoj, kiujn mi fieras kalkuli kiel miajn intimajn amikojn. Sen Esperanto io simila apenaŭ imageblas. Tia estas la potenco de la Internacia Lingvo.

JEDE BELIEBIGE KOMBINATION AUS 12 SPRACHEN

Die neuen zweisprachigen Eisenbahn-Fachwörterbücher der UIC (Internationaler Eisenbahnverband) mit 15000 Stichwörtern sind erschienen. Es wird empfohlen, sie nun zu bestellen.

Bitte beachten Sie hierzu die Veröffentlichung im "Internacia Fervojisto" Nr. 1/96. Dort sind die jetzt verfügbaren Sprachen aufgeführt (weitere sind in Vorbereitung) und das Bestellverfahren geschildert. Alle Kombinationen zwischen diesen Sprachen sind erhältlich. Es ist empfehlenswert, möglichst solche Kombinationen zu bestellen, in denen eine der Sprachen Esperanto ist. Wir weisen darauf hin, daß auch drei- und viersprachige Buchausgaben bestellt werden können.

Interessenten für das gesamte Material (alle Sprachen) können diese auf elektronischen Datenträgern (CD-ROM oder Disketten) erhalten. Bitte wenden Sie sich an die Redaktion.

GEFA

Aus den Gruppen

Bremen *Sinterklaas el Nederlando venis al Bremen (16. 12. 95)*

(Sinterklaas = Sankta Nikolaus)

Per buso alvenis niaj groningenaj geamikoj - kia ĝojo kaj plezuro dum la revida ceremonio!! 16-ope ili alvenis. Nur ŝtuparon supren en la stacidomo - jam ni ĉiuj sidis ĉirkaŭ granda tablo, pretaj ekmanĝi. La komenco estis reciproka salutado. Laŭvice ĉiu ekstaris kaj diris sian nomon kaj aldonis kelkajn, plejmulte gajajn, rimarkojn.

Post la komuna manĝado en la IC-restoracio ni ekmarŝis en du grupoj al la bremena Kristnaskfoiro. Jen estis nepriskribeble granda homamaso. Estas por mi miraklo, ke ni ne perdis unu la alian. Sed, la afero bonege funkciis: Ĉie, kie oni aŭdis Esperanton, tie estis nia grupo. Ni ankaŭ iom flankeniĝis por montri la plej indajn belaĵojn de nia urbo, kio evidente plaĉis al niaj gastoj.

Ni sukcesis gvidi niajn gastojn akurate al la menditaj kafo- kaj kukotabloj en la Transmara Muzeo.

Trinkante kaj manĝante ni rakontis pri la foirejaj travivaĵoj. Estis tre agrabla, trankviliga fino de la Sinterclaas-aventuro. Je la 17a ni adiaŭis niajn nederlandajn geamikojn ĉe la aŭtobuso per multaj koraj ĉirkaŭbrakoj. Ĉiu el ni ricevis gastdonace grandan frukto-mielkukon (Groningena specialaĵo), tiam finiĝis belega, kora nederland-germana Sinterklaas-vizito. Ĝis revido en Den Haag.

Dieter Hartig

Frankfurt am Main

Besinnliches Treffen im Advent.

Zum 7. 12. 1995 hatten die BSW-Esperanto-Gruppen Bez. Frankfurt zusammen mit der Esperanto-Gesellschaft Frankfurt zu einem vorweihnachtlichen Abend eingeladen. Das vielseitige Programm bot u.a. eine Buchausstellung mit Verkauf von Esperanto-Literatur und ein sprachliches Quiz mit Fragen rund um die Weihnachtszeit. Tannenzweige, Kerzenduft und von Mitgliedern gestiftetes Gebäck rundeten die harmonische Atmosphäre ab.

Mein Weg zu und mit Esperanto

von Werner Heimlich

1953 hörte ich erstmals von Esperanto. Meine Ehefrau besuchte da einen Kursus der Eisenbahnfachschule. Zu dieser Zeit befand ich mich in laufbahnmäßiger Ausbildung und hatte keine Lust, etwas zusätzlich zu lernen. Da nach den Briefwechseln persönlicher Kontakt entstand, war ich es leid meine Ehefrau bei Besuchen als Dolmetscher zu benutzen. Über die Eisenbahnfachschule erlernte ich dann 1954 Esperanto.

Da ich Briefmarkensammler bin, entwickelte sich schnell ein reger Briefkontakt. Ich wurde Mitglied der Esperanto-Liga Filatelista und übernahm die Stempelbank. Ich gehöre jetzt zu den Sammlern, die fast alle Marken zum Thema Esperanto besitzen.

1955 gründete ich die Gruppen der Eisenbahner-Esperantisten und des deutschen Esperantobundes in Soltau. Ich wurde Vorsitzender beider Gruppen und leite diese heute noch.

1956 besuchte ich den UEA-Kongreß in Kopenhagen. Dort beeindruckten mich besonders die Vorträge von Prof. Lapenna.

Den ersten IFEF-Kongreß besuchte ich in Aarhus. Es folgten weitere Teilnahmen an IFEF- und anderen internationalen Kongressen. Hierdurch wurden persönliche Kontakte aufgebaut und gefestigt. Bis auf die Jahresversammlungen in Paderborn und Spa habe ich an allen JV von GEFA teilgenommen.

Während der JV 1960 in Trier habe ich die Sprachprüfung mit Erfolg abgelegt.

1961 bestellte mich der Bez.Vorst. des BSW Hannover zum Beauftragten für Esperanto im BSW-Bezirk Hannover. Diesen Posten habe ich am 31. 12. 1995 in jüngere Hände übergeben. Dank gilt hier meiner Ehefrau, die als Fahrer vom Dienst die Arbeit als Bba erleichtert hat.

Stiller Mitarbeiter war ich bei den IFEF-Kongressen in Fulda und Münster. Als Briefmarkensammler sorgte ich auch dafür, daß einige Veranstaltungen von GEFA und IFEF in der Bundesrepublik durch Sonderstempel verewigt wurden.

Dank der Mithilfe von Familienangehörigen und Familie Hartig aus Bremen konnten in unserem Bezirk die Jahresversammlungen von GEFA in Uelzen, Bremen und Verden erfolgreich ausgerichtet werden.

Nach dem Ausscheiden des Kol. Schindler habe ich die Verteilung der Bultenos von GEFA und IFEF übernommen. Diese Arbeit habe ich an den Kollegen Hartig abgegeben.

Ich bin bei UEA Mitglied auf Lebenszeit, Delegierter, Fachdelegierter für Eisenbahn und Philatelie (Esperanto).

Durch Esperanto habe ich viel Freude gehabt und viel gesehen. Da ich nur deutsch und Esperanto spreche, haben die persönlichen Kontakte mit ausländischen Freunden den Wert des Esperanto besonders herausgestellt. Ich freue mich daher, Esperanto gelernt zu haben.

NEUER ASTERIX-BAND

Nach "Asteriks, la gaŭlo" und "Asteriks, la gladiatoro" ist nun ein dritter Band aus der beliebten Comic-Serie in Esperanto erschienen. Er heißt "Asteriks kaj Kleopatra" und handelt von den Abenteuern der unbesiegbaren Gallier in Ägypten. Die Übersetzung ist flüssig. Der beliebteste Satz von Asterix und Obelix: "Ili frenezas, la romianoj" (die spinnen, die Römer). Erhältlich bei: Esperanto-Buchdienst, Am Stadtpfad 11, 65760 Eschborn, Tel. 06196-46194.

FERVOJAJ NOVAĴOJ

Berlin
La Germana Fervojo fondis Kompanion por Telekomunikado (DB-Kom). Tiu ĉi transprenis ĉiujn Telekom-aktivaĵojn de la DB inkluzive 6000 fervojistojn. Kelkaj ekonomiaj entreprenoj kaj bankoj jam proponis sin por aĉeti 49% de la DB-Kom-akcioj.

Bern
La Svisaj Federaciaj Fervojoj (SBB) enkondukos okaze de la horarŝanĝo 1997 novajn duetaĝajn pasaĝertrajnojn, pendolvagonarojn kaj duonhoran trajntakton sur certaj linioj. Tiu projekto "Impulso 97" estos la unua paŝo, celo estas "Fervojo 2000".

Den Haag
En 1996 komenciĝos la privatigo de la Nederlandaj Fervojoj (NS). NS administros la fervojan reton. La pasaĝertrafiko devos rezigni pri ŝtataj subvencioj.



Utrecht
Nederlandaj Fervojoj (NS) planas aĉeti ses ICE-trajnojn. Ili trafikos ek de 1999 sur la projektita grandrapida fervojlinio Amsterdam - Köln - Frankfurt.

Hongkong
La nova fervojlinio inter Hongkong kaj Peking estos finkonstruita en 1996, du jarojn pli frue ol planite.

Paris
Ekde oktobro 1996 trafikos francaj grandrapidaj trajnoj (TGV) inter Paris kaj Milano tra Torino respektive Lyon. Ilia veturtempo reduktiĝos al kvin horoj kaj dudek minutoj.

Praha
La Ĉeĥaj Ŝtatfervojoj (CD) planas redukti ĝis la jaro 2000 sian personaron de nuntempe 105.000 fervojistoj al 75.000. CD disponas pri fervojreto de 9.440 km.

Fonto: BahnZeit 10/95

"Estas strange kaj stulte, ke la homoj ne formanĝas siajn librojn, ili ja apenaŭ legas ilin!" miras la librovermo.

GEHEIMTIP FÜR JUGENDLICHE MIT FERNWEH



Vor kurzem hat die Esperanto-Weltjugend (TEJO) ihr neues Adreßbuch "Pasporta Servo" herausgegeben. Es enthält auf 134 Seiten über 800 Adressen von Familien und Einzelpersonen aus 72 Ländern, die gern Esperanto-sprechende Gäste aufnehmen und sie kostenlos oder sehr preiswert bei sich übernachten lassen. Vor allem junge Leute aus aller Welt haben in den vergangenen Jahren den "Pasporta Servo" als günstige Möglichkeit entdeckt, preiswert zu verreisen, dabei dem Touristen-rummel zu entfliehen und Land und Leute unmittelbar kennen zu lernen. Viele Gastgeber gibt es u. a. in Großbritannien (72), Frankreich (56), Polen (54), Rußland (43), aber auch in anderen Kontinenten, z.B. in neun afrikanischen Ländern.

Das Adreßbuch ist erhältlich bei: Esperanto-Buchdienst, Am Stadt-pfad 11, 65760 Eschborn, Tel. 06196-46194.

FRANKFURT - KÖLN EN 58 MINUTOJ



Ankoraŭ ĝi estas plano, sed la nova linio por grandrapida trafiko jam estas en konstruado kun la celo, ekfunkciigi ĝin en la jaro 2000. Ĝi estos 177 km longa kaj interligos Köln kaj Frankfurt tra Siegburg-Limburg, do paralele al la rivero Rajno tra la montoj. Tial ĝi havos 27 tunelojn (39 km) kaj 18 pontojn (6 km). La plej granda ascendaĵo estos 4%, la maksimuma rapideco 300 km/h. La du flughavenoj Köln/Bonn kaj Rhein/Main estos stacioj de tiu linio. Ĝi fariĝos gravega parto de la eŭropa trafikreto. La mallonga veturtempo de 58 minutoj kompare al 134 minutoj nuntempe certe forlogos multajn homojn el la aviadiloj.

Interese estas, ke la unan fojon oni konstruos linion ekskluzive por grandrapidaj trajnoj (ICE). Krome unuafoje oni aplikos la t.n. firman relvojon, kio signifas, ke la reloj dum jardekoj stabile restos fiksitaj sur betono aŭ asfalto, kio laŭdire grave reduktos la kostojn de bontenado.

Laŭ dpa/Jogi

Redaktfino por n-ro 2/96 estos la 31.5.96
Herausgeber/eldonanto: Bahn- Sozialwerk Hauptvorstand Frankfurt am Main.
Schriftleitung/redakcio: Joachim Gießner, An der Nicolaischule 3, 37412 Herzberg am Harz.
Textgestaltung/tekstaranĝo: Klaus-Dieter Hartig, Kleine Annenstr. 34, 28199 Bremen. Druck/preso Dieter Hartig